

# La Espero

2012:3

Kongresejo /OP



Supea deserto kun verda stelo /OP



## Kongreso 2012 en Helsingborgo



Koltuko ĉe la enirejo al la kongresejo /OP

Kongresa dosiero /BÅn

## LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Marto 2012 • 100-a jarkolekto

Fondita en 1913

**Redaktion:** Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

**Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:**

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, 113 42

Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se

**E-post:** laespero@esperanto.se

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

**Tryck:** Pingvinpress

**Prenumeration 2012:** 200 kr.

Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Adress:** Esperanto-Centro, tel. 08-34 08 00

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

**E-post:** sveda@esperanto.se

**Nätsida:** www.esperanto.se

**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

**Plusgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

**Medlemsavgift 2012:**

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggssexemplar kostar 100 kr/år).

**UEA-avgifter och prenumerationer:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 0910-733810

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

**Postgiro:** 578-5

**Nätsida:** www.algonet.se/~eldona

**E-post:** eldona@telia.com **Telefon:** 070-5850054

## ESPERANTOGÅRDEN

**Adress:** Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

**Nätsida:** www.esperanto.se (meny Esperanto-Gården)

**E-post:** egarden@esperanto.se

**Telefon:** 0590-309 09

## Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Nygatan 10A; 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574

**e-post:** laespero@esperanto.se

	Stoppdatum	Utkommer senast
--	------------	-----------------

Nr 1	15 januari	15 februari
------	------------	-------------

Nr 2	28 februari	30 mars
------	-------------	---------

Nr 3	30 april	31 maj
------	----------	--------

Nr 4	15 augusti	15 september
------	------------	--------------

Nr 5-6	31 oktober	30 november
--------	------------	-------------

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

## NI PREZENTAS

### Victor Olivius, skania esperantisto

Victor Olivius går tredje året på Söderslättsgymnasiet och var intervjuad i Trelleborgs Allehanda, där Victor bland annat föreslog att skolan skulle börja undervisa i Esperanto. Victor deltog också i Esperanto-kongressen i Helsingborg. Ett lägligt tillfälle att få lära känna Victor lite mer.

- < o > -

*Kiujn interesojn vi havas krom Eon? Mi ŝatas lingvojn, precipe aliajn konstruitajn lingvojn. Mi eĉ konstruis propran lingvon por la lernejo.*

*Kiam vi ekinteresiĝis pri Esperanto? Mi havis lernejan kolegon kiu parolas E-on kaj li parolis pri la lingvo kaj inspiris min. Li nun studas lingvistikon en Stokholmo.*

*Al kiu klubo vi apartenas? Mi havas membrokarton al la Malmö klubo sed mi ne estas tie ofte ĉar la distanco estas granda.*



*Kiu libro estas via plej ŝatata? Bona libro estas Svenne de Per Nilsson. Junulara libro kiun mi legis kiam mi estis 13-jara.*

*Kion vi planas fari sekvontjare, post la gimnazio? Mi ankoraŭ ne scias sed mi ne planas studi sed havi malplenan jaron.*

Intervjuis *Bengt Olof Åradsson*

## REDAKTORAJ VORTOJ

Ĵus okazis la kongreso en Helsingborgo. La loka komitato aranĝis belan, bon-etosan kaj enhavriĉan semajnfino. Ĉi-jare mi dumtempe dum la preparado de la kongreso, sekvis la laboron pli proksime kaj vidis kiom multe la LKK laboris por aranĝi ĉion. Mi volas danki la LKK por ties granda laboro por sukcesoplena kongreso. Mi partoprenis kun mia, ankoraŭ ne 6-jara, filo kaj ankaŭ li bone fartis kvankam li ne aŭskultis la prelegojn. Tiujn prelegojn mi espereble povos pli bone prezenti en sekvaj numeroj, por ke pli da membroj povu ĝui ilin.

Dum la kongreso mi kaptis la okazon aĉeti jam uzitan libron de Kalocsay: *Lingvo stilo formo*. La redaktoreco postulis min pli-

bonigi mian lingvoscion kaj uzadon. Mi supozas ke ni ĉiuj esperantistoj devus tion fari, pli-bonigi nian lingvon per legado de bonaj libroj esperantlingvaj.

Alvenis jam la somera varmo kaj same alvenis la tempo por alia maniero praktiki nian lingvon. Ni havos multajn eblecojn somerumi kaj partopreni renkontiĝojn diversloke. Kelkajn proponojn vi trovos en tiu ĉi numero. Se vi partoprenos ie en esperantujo, mi volonte akceptos postajn bildojn kaj [simplajn] raportojn pri la okazaĵoj.

Do, havu bonan kaj belan esperantan someron.

*Bengt Olof Åradsson*

## Helsingborgo

Pri la Esperanto-kongreso en la gazetaro

Pro antaŭlaboro de Kaisa Hansen kaj dissendo de informo al la gazetaro, aperis en diversaj gazetoj, ekz en DN.se kaj HD.se, artikoletoj kun intervjuoj pri la kongreso.

Ĉirkaŭ 50 kongresemluloj venis al Helsingborgo por partopreni la ĉi-jaran esperanto-kongreson.

La kongresejo, la bela kaj kulturprotektata ABF-domo, estas en la urbo centre lokita. Multaj preterpasantoj povis vidi kaj la esperantoflagon kaj du trikitajn koltukojn esperantokolorajn, kiuj pendis ĉe la strata enirejo.

La kutimaj kongresaj kunveno komenciĝis nur sabate, sed pluraj kongresanoj partoprenis jam la

vendredan ekskurson aŭ promenon tra la urbo, uzante la esperantlingvan gvidilon. La ekskurso finis je la tombo de Backman kie la grupo honoris lin per parolo de nia prezidanto kaj florornaĵo.

Vespere multaj kongresanoj ĝuis la vespermanĝon surŝipe inter Svedio kaj Danio. La ceterajn manĝojn oni ĝuis surloke.

Komunuma reprezentanto Mikael Skoog bonvensalutis la kongreson kaj iom rakontis pri la historio de la kongresejo. Post

li, reprezentanto de Svenska Freds ankaŭ salutis la aŭskultantojn kaj je nia granda ĝojo, al SEF ŝi transdonis parton de *Josefina Larssons språkpris*, kiun administras Stockholms Fredsförening (vidu paĝo 4).

La ĉi-jaraj prelegoj dum sabato temis pri la nova gimnazia temo: "mänskans språk". Prelegis unue Folke Wedlin, kiu instruas en Lerum, kaj due prelegis kune kaj dulingve Olof Pettersson kaj Hokan Lundberg, kiuj instruas en Cybergymnasiet en Stokholmo.

Posttagmeze okazis la jarkunveno de SEF. Roland Lindblom estis reelektita prezidanto por unu jaro. Hokan Lundberg estas nova anstataŭanto en la estraro. Ĉi-jare pro la 125-jara jubileo la estraro planas subteni pli da agadoj (Bok & biblioteksmässan, Skoldagarna i Malmö, Skolmässan i Älvsjö kaj Språkdagen) kiuj samtempe bezonos pli da mono. Do granda elpreno el la fondaĵoj.

La supeo sabatvespere estis kaj belaspekta kaj bongusta. La deserton la preparantoj eĉ plibeligis per verda steleto el marcipano. Poste multaj muzikistoj amuzigis la partoprenantojn.

Dimanĉe, post la jarkunveno de la sveda sekcio de KELI kaj partopreno en la diservo en Gustaf Adolfs-preĝejo, prelegis Hokan Lundberg duteme: pri multlingva familio kaj nova projekto pri informa retpaĝo. Pri ĝi vi povis jam pasintnumere legi en La Espero.

Gastoj el Finnlando kaj Danio ankaŭ partoprenis la kongreson.

Fotis: Olof Pettersson (OP), Bengt Olof Åradsson (BÅN)



Manĝprepara grupo /BÅN



Ĉe la librotablo: Per-Olof, Gunnar, Kaisa /BÅN



Roland Lindblom kaj Anna Östberg /BÅN



Mikael Skoog salutis la kongresanojn /OP



Olof Pettersson prelegas /BÅN



Saliko aplaŭdas silente /OP



Ĉiuj muzikantoj amuzigas la kongresanojn /OP

## Esperanto 125 år – en av presentationerna på Park Lanes Pecha-Kucha-kväll den 24 april i Göteborg

**P**ark Lane, i vanliga fall en nattklubb, får några gånger varje år "något japanskt" över sig – det är Pecha-Kucha-night. Det ljudhärmande japanska ordet Pecha-Kucha påminner om sorlet, när många talar.

Under de första 50 minuterna sorlar den mestadels unga publiken friskt. Några japanska arkitekter önskade mer koncentration i presentationer av nya idéer och så tillkom konceptet Pecha-Kucha, som har spritts till drygt 500 städer i världen. Och koncentrerat blir det. Kl. 20:20 tystnar sorlet och arrangörerna berättar om idén bakom Pecha-Kucha. Sedan avlöser ett antal presentatörer varandra: 20 bilder var på storskärm och 20 sekunders tal till varje bild – summa 6 minuter och 40 sekunder.

Det är stor bredd på ämnesvalen, allt ifrån stora planer för Göteborgs stad av politiker och tjänstemän till innovationer och idéer, som privatpersoner brinner för.

Tisdagen den 24 april var det dags för mig att presentera *Språket Esperanto fyller 125 år*.

Vad väljer man ut, när man har så kort tid på sig och ämnet känns så stort? De här 20 bilderna (se nedan) valde jag och jag klarade faktiskt av att inte överskrida de 20 sekunder jag

hade på mig att informera om varje bild.

Extra roligt var det att Mira Helwing hade ordnat ett bokbord med esperantoböcker, som publiken fick ta hem gratis. De gick snabbt åt och det handlade inte bara om enkla nybörjarböcker. Det var roligt att se hur de unga utan tidigare kunskaper i esperanto försökte sig på böcker av Claude Piron / Johán Valano. På bokbordet hade jag också lagt en bunt flygblad med adresser till esperantoklubben i Göteborg, info om sommarkurserna, om Lars Forsmans "Esperanto – över 50 miljoner träffar" och om *Lernu.net*. Om det hela gav något resultat i form av anmälningar till nybörjarkurs vet jag inte idag. Men på Internet fanns ett foto av mig vid första presentationsbilden av *Esperanto 125 år*.

Det här var mitt bidrag till info om esperanto under jubileumsåret. Redaktören för *Goda Nyheter – i Göteborg med omnejd* – fanns med bland åhörarna. Han bad mig skriva om esperanto för sommarnumret, vilket jag just har gjort.

Pecha-Kucha finns i fler städer i Sverige. Kanske du har lust att ställa upp i din stad. Lycka till!

Siv Burell

## Kio okazas en via klubo?

Laŭ ideo dum la kongreso mi en tiu ĉi angulo provos prezenti diversajn klubajn agadojn aŭ okazaĵojn. La informon iu el la klubo devas verki kaj mi poste redaktos (se necese) kaj publikigos ĝin. Ekz:

### El la klubo de Helsingborg:

En la studrondo de klubo Esperantista de Helsingborgo ni decidis ekde la aŭtuna semestro forlasi la lernolibrojn kaj daŭrigi al la esperanta literaturo.

## Språkpris till Svenska Esperantoförbundet

(Pressmeddelande)

Svenska Esperantoförbundet och stiftelsen Wikimedia har nyligen utsetts till delade mottagare av Josefina Larssons språkpris, som förvaltas av Stockholms Fredsförening, en lokalförening inom Svenska Freds- och Skiljedomsföreningen.

Priset överlämnades till Esperantoförbundet av Anna Östberg från Svenska Freds- och Skiljedomsföreningen i samband med invigningen av årets svenska esperantokongress i Helsingborg den 19 maj.

Svenska Esperantoförbundet  
Roland Lindblom

[http://dl.dropbox.com/u/6470210/24%20april-bilder%20\\_Siv%20B..ppt](http://dl.dropbox.com/u/6470210/24%20april-bilder%20_Siv%20B..ppt)



## Esperanto en Indonezio – alvoko

El *Gazetaraj Komunikoj de UEA n-ro 454*

En januaro UEA anoncis la eblecon por studentoj ricevi stipendion de UEA por partopreni trejnkurson pri terminologio, kiu okazos en julio en la Universitato de Vieno kun mondfamaj profesoroj pri terminologio kaj faka komunikado kiel instruistoj. El kvin kandidatoj la Estraro de UEA elektis por la trejnado Olof Pettersson el Svedio kaj Alisa Nikitina el Ukrainio

**S**e vi iom sekvis tion kio nun okazas rilate al Esperanto en Indonezio, vi scias ke la tiea movado de preskaŭ nulo multe kreskis en la lastaj du jaroj. Pasintjare okazis sufiĉe multe: kelkaj grupoj aktivis, ekeldoniĝis la bulteno **ESPERANTO EN INDONEZIO\*** Tatjana Loskutova (el Rusio) vizitis Indonezion kaj instruis en kvin urboj, du indonezianinoj partoprenis plurajn E-aranĝojn en Eŭropo... Tamen la planto ankoraŭ bezonas fortikiĝon... ekz. estus bone se venos indonezianoj al la UK kaj IJK en Vjetnamio ĉi-jare.

En la dua numero de **ESPERANTO EN INDONEZIO** kaj ankaŭ en Facebook kaj per retmesaĝoj ni dissendis alvokon al la indoneziaj esperantistoj† por ke ili kandidatiĝu por subvencio cele al partopreno en la ĉi-jara UK. Al tiu alvoko venis ĝis nun jam pli ol 20 respondoj. Inter ili du personoj jam ricevis la kotizon helpe de eŭropaj esperantistoj. Ni kompreneble rigardos kies partopreno plej multe povas helpi

al la movado. Pluraj el la ĝisnunaj kandidatoj ankoraŭ ne havas 20 jarojn, kaj ne devos pagi kotizon, sed la vojaĝkostoj tamen tro grandas. Ni do volas peti vin helpi al tiuj indonezianoj.

Estas pluraj eblecoj. Vi povas ĝiri monon al la Fondaĵo Tria Mondo aŭ al la konto Azio (ambaŭ ĉe UEA) por helpi pagi la kotizojn aŭ parton de la vojaĝkostoj de la indonezianoj (ne forgesu menciigi "por indonezianoj al UK") aŭ al la konto 'helpid' de TEJO (ĉe UEA) por helpi venigi indonezianojn al IJK.

Se tamen ankaŭ vi preferas pagi kotizon aŭ vojaĝon por iu specifa persono, kontaktu nin por ke ni arangu tion.

Aldone, bonvenas subteno por la daŭra aperigo de **ESPERANTO EN INDONEZIO** (kie vi povas legi multon



Foto de Heidi Goes

pri la progreso de la tiea movado). Por tio, donac(et)oj bonvenas al la UEA-konto iesa-p.

Por denove membrigi indonezianojn al UEA, oni povas ĝiri al Fondaĵo Canuto (ĉe UEA) kun mencio 'por indonezianoj'.

Koran dankon,

*Ilia, Haris kaj Heidi*

PS: por ĉiaj demandoj, vi povas kontakti nin per la sekva adreso: [redakcio-ideo@googlegroups.com](mailto:redakcio-ideo@googlegroups.com)

\* havebla ĉe <http://sites.google.com/site/esperantoenindonezio/bulteno>

† <https://sites.google.com/site/esperantoenindonezio/blogo/alvokoporindonezianoj>

## Esperantomuzeo: de rekordo al rekordo

El la *historio de la Esperantomuzeo*

La muzeon fondis Hugo Steiner en 1927, kaj en 1928 ĝi fariĝis parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko. La solena inaŭguro okazis en 1929 en la pompa salono de la tiel nomata Hofburg.

Post kiam la nazioj invadis Aŭstrion (1938), la Gestapo fermis la muzeon kaj oni planis sendi la librojn al Berlino por krea biblioteko de libroj malpermesitaj fare de nazioj. Sed la argumento, ke la havaĵoj de la Esperantomuzeo apartenas al la Aŭstria Nacia Biblioteko, efike malebligis tiun transporton.

La remalfermo okazis en 1947 en la Hofburg sub Mikaela kupolo. En 1990 fondiĝis per ministeria decido la Kolekto por Planlingvoj kaj tiel strukture disigis la funkciojn de muzeo kaj biblioteko.

En 2005 okazis solena malfermo de la komplete renovigita muzeo en Palais Mollard, kiu situas en la centro de Vieno.

**S**ensacian rekordon povas festi la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko: 9.781 gevizitantoj venis dum la jaro 2011 por vidi la ekspozicion. Por komparo: En 2009 ankoraŭ estis 5.886, en 2010 jam estis 7.523. La kialo de tiu duobliga kresko en nur du jaroj estas plurface de: La muzeo ofertas specialajn programojn, kiuj trovas grandan intereson ĉe la publiko: Longa Nokto de la Muzeoj, Longa Nokto de la Lingvoj, Tago de Monumento, Tago de la Malfermita Pordo.

41 lernejoj klasoj partoprenis la gvidadojn por infanoj kaj junuloj. 870 personoj, precipe lernejoj kaj metilernantoj, ĉeestis fulm-kursojn por Esperanto. Al tio aldoniĝas, ke la Aŭstria Nacia Biblioteko, al kiu apartenas la Esperantomuzeo, faras profesie altnivelan publiklaboron, kio kreskigas konsiderinde la averaĝan nombron de la ĉiutagaj gevizitantoj.

Alia kialo de la pozitiva bilanco certe estas la fakto, ke la koncepto de la muzeo sin direktas al personoj, kiuj ĝenerale interesiĝas pri lingvoj kaj metas Esperanton en la pli vastan kuntekston de la lingva problemo unuflanke, kaj de historia evoluo aliflanke. Esperanto prezentiĝas al la publiko do ne kiel kuriozaĵo, sed kiel parto de la monda kulturo. En rilato kun sia grandeco, la Esperantomuzeo estas la plej ofte vizitata muzeo en Vieno.

Mag. *Bernhard Tuider*  
Sammlung für Plansprachen und Esperantomuseum  
Österreichische Nationalbibliothek  
[www.onb.ac.at](http://www.onb.ac.at)

## La 2-a Internacia Esperanto Semajno

**K**araj samideanoj ĉu vi scias pri “La 2-a Internacia Esperanto Semajno” (IES-2) en Armenujo? Ĝi okazos de la 27-a de junio ĝis la 3-a de julio. IES-2 estos dediĉita al 125-a datreveno de Esperanto en 2012 kaj al 500-a datreveno de la armena presita libro en 2012. La temo: “La libro kiel rimedo de kultura dialogo”. Unesko proklamis Erevan kiel Internacia Ĉefurbo de libro en 2012 jaro. Se vi ne scias pri IES-2, bonvolu viziti: <http://area.am/?Lng=1&ID=12>.

Pri antaŭ kaj post IES-2 ekskursoj <http://area.am/?Lng=1&ID=5>.

Por ke imagu kiel vi pasos la tempon en Armenujo vizitu: <http://area.am/?Lng=1&ID=15>

Venu kaj malkovru antikvan Armenujon!

Ĝis la renkontiĝo en erevana flughaveno “Zvarthnoc”!

Estime **Susanna Baghdasaryan**

Prezidanto de AEU

## 10-a SOMERE en Jünkerath

**Ĉ**i-jare ni povos jubilei: Okazos la 10-a Somera Mezeŭropa Renkontiĝo (SOMERE), de la 13-a ĝis la 21-a de julio 2012. Ni denove kunvenos en la plaĉa Jünkerath, en la Eifel-regiono, meze inter Kolonjo kaj Trier (Treviro), kie okazis jam pluraj belaj someraj kunvenoj de EsperantoLand.

Ĉu vi ŝatas pasigi agrablajn kaj trankvilajn somerajn tagojn en internacia rondo? Ĉu ĉi-jare meze de julio konvenos kaj plaĉos al vi?

### Venu SOMERumi kun ni!

Kiel kutime SOMERE estos taŭga kunveno kaj por spertaj Esperanto-parolantoj kaj por progresantoj aŭ komencantoj, kiuj volas ligi lernadon kaj lingvan ekzercadon kun libertempo.

Pli ol duono de la partoprenantoj kutime parolas Esperanton de dek jaroj aŭ pli – ili do trovas unuflanke lingve simile spertajn homojn kaj aliflanke

povas leĝere akompani la lingvan progreson de la aliaj.

### Lerni Esperanton en EsperantoLand

Ĉiuj konsentas, ke plej bone oni lernas lingvon en la lando mem. Venu do al aranĝo de EsperantoLand por sperti la internacian etoson kaj praktiki Esperanton de mateno ĝis vespero.

Okazos kursoj por komencantoj kaj konversacia rondo por progresantoj. Ekster la kursoj estos daŭra ebleco uzi Esperanton dum la manĝoj kaj dum plaĉa kafumado aŭ teumado, dum promenoj, ekskursoj kaj programofertoj en la domo kaj ĝardeno.

### Lagumado, promenoj, ludoj, prelegoj kaj multa babilado

Logas interalie la apuda ĉarma vilaĝo Kronenburg kun kastela ruino, la lago de Kronenburg kaj la naĝejo en piedira distanco de la domo.

En la domo troviĝas grandega ludosalono kun multaj ofertoj, ekstere estas ludejoj por korbo-pilko kaj piedpilko kaj loko por bivaka fajro. Paŝtas sin sur la herbejo ŝafoj, la domo bredas kuniklojn kaj estas ludejo por infanoj tie – do ĉio taŭga estas disponebla por okupi infanojn kaj plenkreskulojn.

### En domo aŭ tendo

Tranoktado kaj manĝado estos laŭ via plaĉo: Ĉu en la domo aŭ en tendo en la ĝardeno tuj apud la domo (aŭ en via loĝaŭto)? Ĉu komunaj manĝoj aŭ memzorge? Vi povas elekti!

Mi tre afable invitas vin rigardi la retpaĝojn kaj aliĝi. Jen la informpaĝo kaj la aliĝilo pri SOMERE, <http://www.esperantoland.org/somere/>.

Se restas demandoj, mi volonte respondos al ili.

**Lu Wunsch-Rolshoven**  
EsperantoLand

## Loga programo en la franca Esperanto-kastelo Greziljono

Somera programo kun 4 laŭtemaj semajnoj. Resumo interrete: [gresillon.org/somero](http://gresillon.org/somero)

- **julio-21/28:** Art-amatora semajno kun teatro, muziko, dancoj, kantoj, korpomovoj kaj intensaj kursoj. Informoj interrete: [gresillon.org/s1](http://gresillon.org/s1)
- **julio-28/aŭgusto-04:** Alternativa semajno kun verd-politika seminario kaj E-kursoj; por vegetaranoj, verduloj, ekologio-ekonomiko-alternativuloj, naturistoj kaj tendumantoj. Informoj interrete: [gresillon.org/s2](http://gresillon.org/s2)
- **aŭgusto-04/11:** Turisma kultura semajno, kursoj de franca lingvo kaj Esperanto antaŭtagmeze, ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro posttagmeze. Informoj interrete: [gresillon.org/s3](http://gresillon.org/s3)
- **aŭgusto-11/20:** Pupteatra festivalo por infanoj, junuloj, familioj. Farado de manpupoj kaj vesperaj spektakloj kun Christoph Frank. Muziko, gitaro, sporto, ludoj kaj E-kursoj. Informoj interrete: [gresillon.org/s4](http://gresillon.org/s4)

**Kontaktoj:** [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org), +33-241 89 10 34, [www.gresillon.org](http://www.gresillon.org)  
**Adreso:** Gresillon, 49150 SAINT MARTIN D'ARCE, France  
**Jara agendo:** [gresillon.org/agendo](http://gresillon.org/agendo)

## La familio Zamenhof

Troviĝas pluraj biografioj pri Ludoviko Zamenhof. La ceteraj samfamilianoj estas malpli konataj, sed ankaŭ iliaj vivhistorioj estas interesaj. Konante tiujn, ni scias pli pri la medio en kiu Zamenhof elkreskis, pri tiuj proksimuloj kiuj influis lin, kaj kiujn li influis. Tio helpas nin pli bone kompreni Zamenhof kaj la fenomenon Esperanto. Nun publikiĝis dua, “signife vastigita kaj akurate ĝisdatita” eldono de La familio Zamenhof de Zofia Banet-Fornalowa (Kooperativo de Literatura Foiro, 2011, ISBN 3-906595-23-4).

Genealogia arbo kun 83 nomoj, necesa por kapti la parencajn rilatojn inter la Zamenhofoj, enkondukas la libron. Unu ĉapitro estas dediĉita al la gepatroj Marko kaj Liba, kaj po unu al Ludoviko mem, lia edzino Klara, filo Adamo, bofilino Wanda, filino Sofio, filino Lidja, frato Felikso, frato Henriko, frato Aleksandro, fratino Fania, fratino Augusta, fratino Ida kaj nepo Louis Christophe. Krom la ĉefpersono en ĉiu ĉapitro ankoraŭ pluraj parencoj estas traktitaj, eĉ kelkaj posteuloj naskitaj en la 1990-aj kaj 2000-aj jaroj.

La ĉapitro pri Ludoviko estas nur dekpaĝa, kio estas oportuna longeco por ke la emfazo estu sur la aliaj Zamenhofoj. Tio ne malhelpas ke ankaŭ ŝajne flankaj detaloj trovas lokon, kiel la informo ke la teknike praktika Zamenhof inventis skribmaŝinon, por kiu li ricevis patenton, kaj kies modelon oni montris kune kun aliaj inventaĵoj de li dum la

Varsovia Jubilea UK en 1937. Tamen, troviĝis pli bonaj skribmaŝinoj, kaj Zamenhof forlasis la aferon.

Bonega estas la klopodo de la aŭtorino fosi en ĉiaj fontoj por malkovri eblajn mitojn. Unu tia ebla mito, disvastigita de i.a. E. Privat, estas ke la patro forbruligis la manuskriptojn de sia juna filo pri Lingwe Uniwersala.

Banet-Fornalowa sufiĉe konvinkte montras ke la fontoj de tiu “fakto” ne estas tre fidindaj, kaj ke laŭ aliaj signoj la patro pozitive sin tenis al la lingvo de Ludoviko. Do: “Verŝajne neniam oni scios ĝisfine, kio vere okazis kun la manuskriptoj” (p. 26).

Krom lingvoinstruisto, la patro Marko dum multaj jaroj estis cenzuristo por la rusa administracio en Varsovio. Tio tamen ĉesis en 1888. Marko Zamenhof estis aprobinta publikadon de artikolo pri vino kaj vinberkulturado. Laŭ tiu artikolo iomete da vino estus bona por la sano, sed tro multe povus kaŭzi frenezecon kaj pardon de la prudento. La ĉefcenzuristo en Peterburgo, kiu mem estis alkoholulo, bone sciis ke ankaŭ la caro tro multe trinkadis. Do, Marko Zamenhof grave “kulpis”, ĉar li permesis publikadon de artikolo, kiu ofendis la caron! Tiu preteksto sufiĉis por forigi lin kiel cenzuriston.

Pluraj Zamenhofoj estis profesiaj kuracistoj kaj flanke esperantistoj. Lidja, la plej juna filino de Ludoviko kaj Klara, kontraŭe fariĝis profesia esperantistino. Ŝi ankaŭ laboris por disvastigi la Bahaan

religion en kombino kun Esperanto. Ŝi ne nur skribis artikolojn kaj tradukis librojn, sed vojaĝis kaj faris prelegojn kaj gvidis kursojn en pluraj landoj. I.a. ŝi estis en Svedio en 1932, vizitante Gävle, Skutskär, Upplandsbodarna kaj Strömsbro por instrui laŭ la Ĉemetodo. Sufiĉe longa ĉapitro estas dediĉita al ŝia vivo, kiu same kiel la vivoj de ŝiaj gefratoj Adam kaj Sofio kaj onklino Ida tragike finiĝis dum la holokaŭsta murdado.

En tia informriĉa libro, publikigita en du eldonoj kaj kun tekstopartoj skribitaj en tre malsamaj tempoj, neeviteble enŝteligas kelkaj nekoheraĵoj. En la ĉapitro pri Klara, ni legas ke “Aleksandro, la plej ŝatata frato [de Ludoviko], solvis sian militistan problemon per sinmortigo en fora Ruslando” (p. 44). Laŭ pli posta ĉapitro, kie diversaj fontoj pri la afero estas analizataj kaj taksataj, ni ne certe scias kiel Aleksandro mortis: “Por la historio la afero ne estas tute klara” (p. 182). Tamen, ŝajne estas minimumo da tiaj malglataĵoj, kaj ili ne detruas la ĝeneralan impreson de la libro.

Konklude, La familio Zamenhof estas tre valora libro. Ĝi prezentas interesajn faktojn pri la Zamenhofa familio. La aŭtorino tamen ne senpripense redonas faktojn, kiujn ŝi trovis per propraj esploroj aŭ kiujn aliuloj trovis, sed skrupule priesploras iliajn fidindecon. Tiele la kvalito fariĝis alta. Krome, la libro donas agrablan legadon en facila kaj bona lingvo.

*Bo Sandelin*

## Poesitävling på årets Europeiska språkdag

Den 26 september är det återigen dags för den Europeiska språkdagen, som i Stockholm kommer att firas i Europahuset, i likhet med flera tidigare år.

Även i år finns det även en tävling för skolungdomar mellan 13 och 18 år, öppen för deltagare från hela landet. Tävlningen går ut på att skriva en dikt på ett (eller flera) språk som talas i Europa (alltså även esperanto!), med undantag

för svenska och engelska. Dikten måste dock även översättas till antingen svenska eller engelska, men det är endast dikten i originalspråk och det filmade uppläsandet av den som ligger till grund för juryns beslut. Mer information om tävlingsreglerna och firandet av språkdagen finns på nätet, [www.sprakdagen.nu](http://www.sprakdagen.nu).

*Olof Pettersson*

## Du poŝtmarkoj ...

**L**a 21-an de marto ĉi-jare la poŝto eldonis serion da poŝtmarkoj por honorigi la svedan fotoarton. La serio konsistas el kvin markoj kiuj montras fotojn de famaj svedaj fotistoj. Unu el tiuj estas Sune Jonsson. Tion informas teksto sur la dorsflanko de la markoj sed ĝi ankaŭ donas por esperantistoj aparte interesajn informojn pri la motivo de lia marko kaj nun mi citas (traduko el la sveda): "La revulo en la blua domo", Johan Engman fraŭlo kaj esperantisto k t p, kun sia Dürer-biografio en Esperanto, Djupsjönäs, 1957.

Por kompletigi la informojn aldonendas ke tiu libro pri Dürer estas luksa esperantolingva eldono de la Germana Esperanto-Asocio en la jaro 1911, do antaŭ 101 jaroj. La verkisto estis Friedrich Nüchter kaj la esperanta titolo estas "Albrecht Dürer, lia vivo kaj elekto el liaj verkoj". Djupsjönäs estas treege eta vilaĝo



en norda Svedio, ĉirkaŭ 50 km sudokcidente de Umeå.

Inter la loĝantoj en tiu vilaĝo Johan Engman estis konsiderata kiel strangulo, revulo kaj esperantisto. Ne mirige ke tiel estis, ĉar neniu el liaj najbaroj tie en la densaj arbaroj de norda Svedio revis pri la venko de iu artefarita lingvo, legis librojn pri la mondfama grafikisto Dürer kaj kolorigis sian domon blua – alia koloro de espero.

Estus interese vidi la reagon de la verkisto kaj la tradukisto se oni

estus povinta informi al ili ke post pli ol 100 jaroj ilia luksa libro troviĝos sur sveda poŝtmarko!

Plurfoje la svedaj esperantistoj provis konvinkigi la poŝton eldoni poŝtmarkojn por honorigi Esperanton, plej laste antaŭ la 100-jara jubileo de la lingvo, sed nun subite kaj tute neatendite - certe ankaŭ tute senintence flanke de la poŝto – venis marko ĝustatempe por la 125-jara jubileo!

*El Kelklinie pri ...  
numero 2012:2*

## ... ur pressmeddelande

**F**ör att uppmärksamma 125-årsdagen av utgivningen av den första esperantoboken och för att göra reklam för språket, har Universala Esperanto-Asocio (UEA) av det nederländska företaget PostNL beställt frimärken med jubileumsemblem designat av den brittiska esperantisten Peter Oliver.



Frimärket gäller för första-klass inrikes brev upp till 20g i Nederländerna. I mars dök samma symbol upp på ett finskt frimärke beställt av det finska esperantoförbundet, Esperanto-Asocio de Finnlando.

Det nya nederländska frimärket presenterades inför Öppet Hus-dagen på UEA:s huvud kontor i Rotterdam den 28 april, men redan någon vecka innan var det möjligt att köpa frimärket genom UEA i block om 10 märken.

Frimärket om 125-årsdagen av esperanto är det femte i ordningen, beställt av UEA. De tidigare märkena har fått mycket publicitet i nederländska filateltidskrifter, och det kan förutses också för det nya.

Ämnena på de två första märkena, som gavs ut 2008, var

den 93:e esperanto-världskongressen i Rotterdam och 100-årsdagen av grundandet av UEA. Båda är redan slut, men fortfarande finns frimärken från 150-årsdagen av esperantos skapare L. L. Zamenhofs födelse, och från 100-årsdagen av Ivo Lapennas födelse (ordförande för UEA 1964–1974), både utgivna under 2009.

Även i Sverige har Posten nyligen gett ut ett frimärke med anknytning till esperanto: I serien *Fotokonst* finns ett frimärke med ett fotografi av Sune Jonsson från 1957, föreställande esperantisten Johan Engman från Nyåker i Västerbotten, som Dagens Nyheter Lars Epstein skrev om den 15 mars tidigare i år.

*Roland Lindblom*